

N. N. 32,  
Es ist ein Ros entsprungen

1. Es ist ein Ros entsprungen  
aus einer Wurzel zart,  
wie uns die Alten sungen,  
von Jesse kam die Art  
und hat ein Blümlein bracht  
mitten im kalten Winter,  
wohl zu der halben Nacht.

2. Das Röslein, das ich meine,  
davon Jesaia sagt,  
ist Maria die reine,  
die uns das Blümlein bracht.  
Aus Gottes ewgem Rat  
hat sie ein Kind geboren  
und blieb ein reine Magd.

3. Das Blümelein so kleine,  
das duftet uns so süß,  
mit seinem hellen Scheine  
vertreibt's die Finsternis:  
Wahr' Mensch und wahrer Gott,  
hilft uns aus allem Leide,  
rettet von Sünd und Tod.

N. N. 32,  
Elkreskis rozbranĉeto  
*tradukita de Joachim Gießner*

1. Elkreskis rozbranĉeto  
el rozarbust' de Di'.  
Aŭguro de profeto  
rakontis jam pri ĝi.  
Naskiĝis rozfloret'  
meze en vintra nokto  
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -  
Jesaj' prognozis ĝin -  
el sia korpo sproson  
Mari' la virgulin'.  
Laŭ dipotenza vol'  
si naskis Di-infanon  
por tutu mond' konsol'.

3. Kaj tiu belforeto  
tre hele lumas ĝi.  
Obskuron la brileto  
forprenas nun de ni.  
Vi hom' kaj vera Di'  
el pekoj kaj suferoj  
estas savant' por ni.

N. N. 32,  
Rozbranĉo forĝermadis  
*tradukita de Felix Ney*

Rozbranĉo forĝermadis  
el trunk' de nobelec'.  
Prauloj jam kantadis:  
de Jišaj ĝia spec'.  
Floreten portis ĝi,  
en akra vintro estis,  
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita  
Jesaja de profet':  
Maria netuŝita,  
de kiu la floret'.  
Eterne volis Di':  
naskinta infaneton  
Plej pura restis si.

De tiu eta floro  
alvenas bonodor'  
Ĝi brilas en la koro,  
mallumon pelas for.  
Homido, Dia Vort',  
nin el sufero helpas,  
De pek' Savant' kaj mort'.

...

...

...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 32.

Arg-618-1243 (2012-10-18 21:49:44)

Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en la germana evangelia eklezia kantlibro, kanto n-ro 23. Vidu ankaŭ la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Es\\_ist\\_ein\\_Ros\\_entsprungen](http://de.wikipedia.org/wiki/Es_ist_ein_Ros_entsprungen). - La teksto troviĝas ankaŭ en la retejo <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Tie estas audebla ankaŭ la melodio.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html>.